

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO „LEXICON SILVESTRE“ R.A.

No. 44 Eberswalde, 2001-12-01

1. Informo pri la membrokunveno de "Patrona Asocio „Lexicon silvestre” r.A.“ je 2001-10-12

La protokolon de la membrokunveno vi trovos kiel aldonajon 1.

2. Informo pri la preleg-aranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2001" je 2001-10-12

La aranĝo denove estis aranĝita kune kun "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A., IFRE kaj Ebersvaldea Kulturligo r.A.. La sekvaj gesinjoroj sendis salutojn al la aranĝo: Prof. D-ro Anders, geedzoj Blanke, s-ro Blaško, s-ro Cram, prof. d-ro Lipoglavšek, s-ro Moudrý, geedzoj Panka, geedzoj Schneck, d-ro Schubert, s-ro Weidner. D-ro Simon malfermis la kunvenon kun dankesprimo al la Faka Altlernejo Eberswalde pro la disponigo de lekcialono. S-ro Ullrich direktis la aranĝon. La planita prelego forrestis, ĉar s-ro Pachter pro aŭtomobil-paneo ne povis veni al Eberswalde.

2.1 Boris D. Marinov, Karl-Hermann Simon, Ingward Ullrich: Spertoj kun norm-terminoj en „Lexicon silvestre“ (v. aldonajo 2) Dum la diskuto demando de d-ro Götz pri la agmaniero de ŝanĝo de normterminoj. D-ro Simon atentigis pri la eo-laborgrupo, kiu kontaktas al ĉiuj esperantlingvaj geforstistoj.

2.2 Bernhard Götz: Pluevoluigo de Ebersvaldea et-arbarera arboreto (v. aldonajo 3) La prelego estis fundamentata per multaj bildoj kaj specialaj mapoj pri la arboreto. Oferto de d-ro Götz, aranĝi gvidon tra la arboreto.

2.3 K.-H. Simon/Horst Weckwerth: Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro (v. aldonajo 4) D-ro Weckwerth prelegis. Poste detale estis diskutata la tri demandoj, starigitaj dum la prelego. Al la unua demando oni opiniis, indiki la referenc-numerojn laŭ la ĝisnuna maniero. Rilate la duan demandon oni sekvis la proponon de prof. Lipoglavšek, kompletigi la sciencan nomon per la koncerna plej kutima etnolingva nomo. Al la tria demando, rilate la „Index“ en la volumoj, la propono superpezis, provizore ne eldoni apartajn „Index“-volumojn. Sed uzanto ĉiam disponu pri tuta „Index“. Oni diferencis pri la agmaniero ĉe reeldonoj, kiuj ja ĉiam estas plibonigitaj kaj kompletigitaj. Eble ili povus enhavi „Index“, de ĉiuj ĝis nun eldonitaj partoj. Ni petas pri la opinio de pluaj Ls-uzantoj.

3. Forstfaka terminologia laboro 2002“

Por la prelegaranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2002", kiu estas planita por la oktobro 2002, anoncoj kaj deziroj pri prelegoj estas deziritaj.

4. Librooferto

Ekde la oferto en FI 43 ni eldonis la jenajn volumojn:

	Prezo:	DM	€
„Lexicon silvestre, Prima pars,,			
Русская версия (I/ru/1) с дефинициями			
Изд. 1-ое, 2001, (Geb)	3-931 262-50-2	55,74	28,50
Изд. 1-ое, 2001, (Ringh)	3-931 262-51-0	35,20	18,-
„Lexicon silvestre, Secunda pars,,			
English version (II en/1) with Definitions. X, 164 p.,			
1 st Ed., 2001, (Geb)	3-931 262-60-X	72,37	37,-
1 st Ed., 2001, (Ringh)	3-931 262-61-8	52,80	27,-
„Lexicon silvestre, Tertia pars,,			
Version française (III fr/1) avec définitions			
1 ^{RE} Édition, 2001, (Geb)	3-931 262-56-1	70,41	36,-
1 ^{RE} Édition, 2001, (Ringh)	3-931 262- 57-X	50,85	26,-

„Lexicon silvestre, Quinta pars,,

Deutsche Version (V de/1) mit Definitionen. X, 194 p.

1. Auflage, 2001, (Geb)	3-931 262-64-2	77,26	39,50
1. Auflage, 2001, (Ringh)	3-931 262-65-0	57,70	29,50
Esperanto lingva versio (V eo/1) kun difinoj. X, 115 p.			
1a Eldono, 2001, (Geb)	3-931 262-62-6	53,78	27,50
1a Eldono, 2001, (Ringh)	3-931 262-63-4	44,01	22,50

Al asocioj de „Patrona Asocio ‚Lexicon silvestre‘ r.A.“ ni povas doni rabaton ĝis 50 %.

5. Pri la uzado de "Internet"

Por kelkaj ricevantoj de "Forstista Informilo" ni jam povis uzi "Internet", ĉar aŭ ili mem proponis tion aŭ ni konas ilian e-mail-adreson. Ni intencas en la estonteco uzi pli vaste tiun komunikadan rimedon, por mallevigi la ŝarĝadon de la Patrona Asocio per la preparo de la paperaj ekzempleroj kaj la ekspedado. Tial ni petas vin informi nin pri via e-mail-adreso sed ankaŭ pri tio, ĉu vi plu preferas ricevi paperan ekzempleron.

6. Indikoj pri bank-konto

Por ĝirado de membrokotizoj kaj financaj donacoj:

Kontonumero: 39 010 88 104; banknumero: 17 052 000; Sparkasse Barnim en Eberswalde.

La Direkcia Konsilio de la "Förderverein" dankas al ĉiuj kunagantoj pro la laboro plenumita de ili kaj deziras al ili kaj iliaj familianoj sanon kaj kreadan potencon dum la nova jaro.

Aldonaĵoj:

Pro financaj kaŭzoj la prelegoj povas aperi nur resume. Interesitoj povas mendi kopion de la kompletaj prelegmanuskriptoj ĉe Patrona Asocio "Lexicon silvestre" .r.A. en Eberswalde aŭ ĉe la aŭtoroj .

- 1) Protokolo de la membrokunveno je 2001-10-012
- 2) Boris D. Marinov, Karl-Hermann Simon, Ingward Ullrich: Spertoj kun norm-terminoj en „Lexicon silvestre“
- 3) Bernhard Götz: Pluevoluigo de Eberswaldea et-arbarera arboreto
- 4) Karl-Hermann Simon/Horst Weckwerth: Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro

Herausgeber: Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V., Eberswalde. Adresse: Fachhochschule Eberswalde, Bibliothek, Friedrich-Ebert-Straße 28, DE-16225 Eberswalde.

Redakteur: Dr. Karl-Hermann Simon, Carl-von-Ossietzky-Str. 21, DE-16225 Eberswalde. Tel. +49-3334-22154
Email: khsimon@fh-eberswalde.de> Nicht gekennzeichnete Texte stammen vom Redakteur.
<http://www.fh-eberswalde.de/info.htm>

Aldonaĵo 1

Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.
- Direkcia Konsilio -

Protokolo de la membrokunveno je 2001-10-12 en Eberswalde, Alfred-Möller-Str., prelegsalono 3

Komenco de la kunveno: 14.10 h

Ĉeestantoj: D-ro Götz, s-ino U. Müller, s-ro Panka, s-ro Peters, d-ro Simon, d-ro Weckwerth, s-ro Ullrich

Proponita tagordo:

1. Bonvenigo kaj komencigo
2. Konstato pri decidrajto
3. Akcepto de la tagordo
4. Akcepto de la jarraporto 2000 de la direkcia konsilio
5. Raporto de la kasrevizorino
6. Senŝarĝigo de la direkcia konsilio
7. Elekto de la direkcia konsilio
8. Elekto de la kasrevizoro
9. Decido pri la akcepto aŭ rifuzo de deklaroj pri membriĝo
10. Kromaj problemoj

Al 1: D-ro Simon malfermis la kunvenon kaj informis, ke la sekvaj gemembroj sin senkulpigis pro ne ĉeestado: s-ino Blanke, s-ro Blaško, s-ino Morgenstern, s-ro Römpler, s-ro Schleif, s-ro Weidner.

Al 2: Konstato, ke la kunveno estas laŭorde kunvokita kaj estas decidrajta.

Al 3: Laŭ propono de d-ro Simon la kunveno decidis, ke oni anticipu la punkton 9 de la tagordo kaj kunigu la punktojn 7 kaj 8.

Al 9: Post la memprezento de d-ro Götz oni akceptas lian deklaron pri membriĝo.

Al 4: La skriban jarraporton 2000 jam havis ĉiuj ĉeestantoj post publikigo en "Forstista Informilo" No.43.

La ĉeestantoj aprobis la jarraporton sen diskuto.

Al 5: La kaskontrola raporto de s-ino Henze estis voĉlegita de d-ro Simon kaj estis aprobita sen diskuto.

Al 6: Per la akcepto de ambaŭ raportoj la Direkcia Konsilio estis senŝarĝita.

Al 7 kaj 8: Oni elektis s-ron Ullrich kiel gvidanton de la elekto kaj d-ron Weckwerth kiel balot-asistanton.

S-ro Ullrich informis, ke ekzistas la sekva listo pri kandidatoj:

D-ro Götz, s-ino Reimann, d-ro Simon, s-ro Weidner, d-ro Weckwerth.

Por la kasrevizorino s-ino Henze denove kandidatis.

Deklaroj pri preteco ekzistis de ĉiuj gekandidatoj.

Okazis sekreta baloto per balotiloj.

La baloto havis jenan rezulton:

- Estis donitaj 7 voĉoj.

- Ĉiuj balotiloj estis validaj.

- El la eldonitaj voĉoj ricevis s-ino Reimann 5 voĉojn, ĉiuj aliaj kandidatoj ricevis 7 voĉojn.

Do oni aprobis la kandidatojn por la direkcia konsilio kaj la kasrevizorino.

La membrokunveno rekomendis al la konsilio plu serĉi kandidaton por dua kasrevizoro.

Al 10: Ĉar ekde la sekvonta jaro validas la EURO, necesas nove fiksi la membrotizon. La propono, pagi 15 EURO po membro estis unuanime aprobita fare de la kunveno post diskuto.

Fino de la kunveno: 14.30a horo.

Protokolanto: D-ro Weckwerth

Aldonaĵo 2

Spertoj pri norm-terminoj en „Lexicon silvestre“

Boris Dimitrov MARINOV, Velingrad, Karl-Hermann SIMON, Eberswalde, Ingward ULLRICH, Hildburghausen

Kontraŭe al la ĉiutaga lingvo, por kiu la plursenceco de multaj esprimoj estas „la salo en la supo“ de la lingvo, la faklingvo necesigas eble plej grandan unusencan interkompreniĝon inter la fakuloj. La kreado de norm-terminoj jam komencis en la 19a jarcento en la aŭtoindustrio. Nur en la 20a jarcento WÜSTER kaj DREZEN kreis la bazajn principojn de nova branĉo de scienco, de la terminologia scienco. Ĝiaj bazaj principoj nun estas fiksitaj en normoj. Aparte gravas, ke oni diferencu inter nocio kaj ties nomumo per termino. En „Lexicon silvestre“(Ls) oni strikte agis tiamaniere. Sed kontraŭe al la kutima praktiko ĉe

plurlingva vortara laboro harmonigi samajn nociojn en la diversaj lingvoj, en Ls oni prenas samajn nocio-

difinojn kiel la bazon, al kiuj oni kolektas la terminojn.

Tiu ĉi agmaniero kaj la kunlaboro de geforstistoj havantaj Esperanto-lingvopovon ebligis, komenci la terminologian prilaboradon de forstfaka lingvo por Esperanto. La laŭnombre malgranda diskutrodo kaj aliflanke la manko de ekonomia subteno estigis specialajn kondiĉojn. La spertoj de tiu ĉi pilotprojekto

kun la publikigo de norm-termin-proponoj por la forsta fako estas prezentataj.

Ekde 1995 estis proponitaj la norm-terminojn por 4047 nocioj. Intertempe estis ŝanĝitaj ĉ. 3 %. La diversaj kaŭzoj de la ŝanĝoj estas kunmetitaj en 10 grupoj. Ili ampleksas 10 diversajojn de „skriberaroj“ ĝis „anstataŭo per norm-termino kun alia vortradiko“. La plurlingva Ls-projekto kreis eksterordinare bonajn kondiĉojn por la uzado de vortradikoj el diversaj lingvoj.

Aldonaĵo 3

Pluevoluigo de Ebersvaldea et-arbarera arboreto

Bernhard Götz, Eberswalde

La et-arbarera arboreto de la ebersvaldea forst-botanika ĝardeno estis fondita en 1954 fare de Prof. Dr. Horst LYR, kiu gvidis inter 1953 kaj 1970 la Instituton pri Forstbotaniko kun la forst-botanika ĝardeno de la Humboldt-Universitato. Post konvencio kun la forstadministracio oni povis ĉe la sudflanko de tiu „ĝardeno“ enplanti malgrandajn arbarerojn de fremdlandaj arbaspecioj en la arbaron kadre de normala arbar-mastrumado. Intertempe estiĝis ĉ. 70 et-arbareroj kun 60 diversaj arbaspecioj. La respektivaj arbarparceloj havas grandojn inter 100 kaj 5000 m².

La et-arbarera arboreto troviĝas en rava pozicio rande de natur-rezervejo, ene de protekta pejzaĝo kaj estas legitimita ripozarbaro per leĝo ekde 1998. Pere de varioplena tereno-reliefo kaj la najbareco al flua tereno de flua akvejo oni tie trafas diversajn grundoformaciojn.

Kaŭze de diversaj cirkonstancoj oni devas plivastigi la originan celon, testi la kultivindecon de diversaj ekzotaj arbospecioj. Unue ekzistas laŭ opinio de la aŭtoro jam multaj tiaj kultivprovoj kun scienca produktadpovologia fono. Ĉi tie oni menciis la kultivprovojn de la forstaj esplorinstitutoj, ekz. la pli ol 100 jaroj aĝajn provkultivaĵojn de A. SCHWAPPACH ĉe Bad Freienwalde, kiujn prizorgas la landa esplor-instituto Eberswalde. Alie estas la ŝanĝiĝintaj postuloj de la faklernejo Eberswalde, al kiu la „ĝardeno“ intertempe apartenas, kaj de aliaj „verdaj“ institucioj en Eberswalde. La terenoj, ĝis nun preskaŭ sole fonditaj per unuspeciaj pingloarabaj kultivaĵoj, oni nun kompletigu per celata plantado de fremdlandaj folio- kaj pingloarboj. Tiuj ĉi oni kultivos miksite laŭ ilia natura speciokompozicio forme de arbarformacioj. Ankaŭ estas demonstrataj raraj eŭropaj lignecaj specioj. Ĉi tie oni menciis aparte la tiel nomatajn savaĝajn fruktajn lignecajn plantojn de la familio Rosaceae, kiuj havas specialan ekologian signifon. Tio estas la antaŭkondiĉo

por konvenaj instruaranĝoj kaj staĝoj, por diplomalaboroj, disertacioj kaj propraj esploroj sur la kampo de ekologio de lignecaj plantoj.

Aldonaĵo 4

Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro

Karl-Hermann SIMON kaj Horst WECKWERTH, Eberswalde

Komence estas raportata pri la progresoj en la „Lexicon silvestre“(Ls)-projekto ekte oktobro 1999. Estis publikigitaj por „Secunda pars“ la unuaj eldonoj de la angla kaj ĉeĥa versioj kaj por „Quarta“ kaj „Quinta pars“ la germana kaj Esperanto-lingva versioj kaj la „Nomaro de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo“. Sume estas 51 ISB-numeroj ekde 1995. Estas bedaŭrinde, ke eĉ la Ebersvaldeaj studentoj ne konas la Ls.

Estas informate pri la rezulto de du enketoj inter la Ls-uzantoj pri la indiko de referenco-numeroj en la difinoj kaj pri la uzado de nacilingvaj nomoj por plantoj kaj bestoj en Ls, indikitaj ĝis nun nur per la scienc-latinaj nomoj. La propono, ankaŭ indiki la pleje uzatan nacilingvan nomon, estas realigota. La ambaŭ aŭtoroj nun demandas pri la agmaniero por la eldono de pluaj partoj de Ls. Pro la daŭre amplekiĝanta „Index“ la volumoj de ĉiu sekvonta parto kreskas en la plej gravaj lingvo-versioj je dudek paĝoj.

Pro la daŭre kreskanta laboro en la Ebersvaldea centralo ni esperas pri la helpo de pluaj interesuloj, speciale de rentuloj.

La vido trans la Ls-projekton en la estontecon evidencigas, ke la flegado de germana forstfaka lingvo estos neevitebla. Nian proponon, formi konvenan laborrondon, prof. d-ro Wolff sendis intertempe al la prezidanto de la Ligo de germanaj forstfakaj esplorinstitutoj.

Feliĉan Novjaron